Kiel funkcias IS?

Bonvenon en la IS! En ĉi tiu folio ni volas doni al vi la plej bazajn informojn pri la renkontiĝo kaj helpi vin orientiĝi en la programo.

Kio estas la IS?

"IS" estas mallongigo por "Internacia Seminario". Ĝi okazis la unuan fojon dum la silvestra semajno de la jaro 1957, kaj ekde tiam ĉiun jaron. Intertempe ĝi estas unu el la plej grandaj kaj popularaj junularaj Esperanto-renkontiĝoj en la mondo: ĉiun jaron ĉirkaŭ 300 gejunuloj el la tuta mondo partoprenas la IS-n.

Ĉu vi ĵus alvenis?

Iru al la **akceptejo**! Ĉi tie vi povas registriĝi, pagi vian kotizon (se vi ankoraŭ ne komplete pagis ĝin) kaj ricevos vian broŝuron kaj ĉiujn aliajn necesajn informojn.

Kio okazas dum la IS?

En la programo de la IS estas tre diversspecaj programeroj. La partoprenantoj povas tute libere elekti la programerojn kiujn ili volas partopreni, oni ne "devas" partopreni en iu programeroj. Vi povas elekti el la sekvaj program-partoj:

1. Tema programo

En la tema programo oni okupiĝas pri la temo de la IS. Ekzistas diversaj manieroj por tio: en prelegoj la partoprenantoj aŭskultas preleganton laŭtlegi aŭ libere rakonti pri certa temo. En diskutrondoj ĉiuj partoprenantoj diskutas pri kompleksa temo. En laborgrupoj la partoprenantoj lernas pri certa temo per praktika laboro.
La tema programo okazas ĉiutage antaŭtagmeze kaj posttagmeze. Ĉiu programero daŭras ĉirkaŭ 90 minutojn.

2. Distra programo

En la distra programo oni okupiĝas pri multaj diversaj libere elekteblaj temoj kiuj NE estas la aktuala IS-temo. Oni uzas la samajn manierojn por tio: ekzistas prelegoj, diskutrondoj kaj laborgrupoj. Krome, okazas ankaŭ kursoj pri Esperanto aŭ alia lingvo, dancoj, sporto,...
Ankaŭ la distra programo okazas antaŭtagmeze kaj posttagmeze kaj daŭras ĉirkaŭ 90 minutojn po programero.

3. Vespera programo

Tre diversspecaj programeroj okazas dum la vesperoj. Tradicie okazas jenaj programeroj:
La **Interkona Vespero** okazas dum la unua vespero de la IS. En diversaj ludoj vi povas krei unuajn kontaktojn kaj ekkoni aliajn partoprenantojn.
Dum la **Silvestra Vespero** estas unue granda bufedo por ĉiuj partoprenantoj. Post tio okazas la granda silvestra balo. Preskaŭ ĉiuhore kelkaj partoprenantoj festas la novan jaron en ilia hejmlando. Krom la dancado estas kelkfoje ankaŭ specialaj malgrandaj programeroj kiel danckonkursoj.
La **Novjara koncerto** okazas tradicie la 1an de januaro. Diversaj kontribuantoj ludas diversajn stilojn, ekzemple klasiko, ĵazon,...
La **Internacia Vespero** estas la lasta vespero de la IS. En ĝi la partoprenantoj povas montri skeĉojn, kantojn aŭ aliajn kontribuojn.

Krom tiuj programeroj okazas kutime ankaŭ granda **koncerto de Esperanto-muzikgrupo**, **teatraĵo** aŭ **kabaredo**, **sorĉado** kaj aliaj interesaj prezentaĵoj, ĉiuvespere io alia. Rigardu en la broŝuron de la IS por esti akurate informata!

4. Nokta programo
La programo ne finiĝas post la vesperaj programeroj. Nun vi povas elekti inter la sekvaj noktaj programeroj:
En la **diskoteko** vi povas danci ĝis la mateno. Oni ludas internacian kaj konatan muzikon. Kelkfoje estas ankaŭ programo, dum kiu estas ludata nur speciala muziko. Plejgrave, ĉi tie okazas ankaŭ **La Bamba**! Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis pri La Bamba? Tiukaze nepre vizitu la diskotekon por rigardi - kaj partopreni!
En la **trinkejo** vi povas ĝui la nokton kun multaj aliaj partoprenantoj, babili, ludi,... Kelkfoje okazas ankaŭ ĉi tie certaj programeroj kiujn vi povas spekti aŭ eĉ partopreni.
La **teejo** estas alternativo por la trinkejo: ĉi tie oni ne vendas alkoholaĵojn kaj oni ne rajtas fumi. Ĝenerale, estas pli trankvile ĉi tie. Kutime okazas laŭtlegado de Esperanto-literaturo je noktomezo. Se vi volas partopreni tion, venu antaŭ la komenciĝo ĉar la pordo estos ŝlosita dum la laŭtlegado!

5. Ekskursoj
Vi povas partopreni diversajn ekskursojn dum la IS.
Estas unu **tuttaga ekskurso** en kiu oni iras - kutime per aŭtobusoj - al diversaj interesaj lokoj kiuj estas proksimaj al la IS-ejo. Atentu: por tiu ĉi ekskurso vi devas pagi certan sumon, krome ne ĉiuj IS-partoprenantoj povas kunveturi, do provu aĉeti bileton frue! Pliajn informojn vi trovos en la broŝuro aŭ sur informiloj en la IS-ejo.
Krome, ekzistas ankaŭ kelkaj aliaj ekskursoj kiujn vi povas partopreni senpage. La 1an de januaro tagmeze okazas tradicie **novjara promenado**. Pri pliaj ekskursoj informiĝu en la broŝuro aŭ en la IS-ejo.

Kie ricevi pliajn informojn?

Unua informilo por vi certe estas la **IS-broŝuro**! Krome, parto de la **organizo teamo** okupiĝas speciale pri novaj partoprenantoj - do, se vi havas demandojn aŭ problemon, vi povas paroli kun tiuj homoj. Krome, vi povas iri al la **oficejo** de la organizantoj. Rimarku, tamen, ke ankaŭ la organizantoj estas partoprenantoj de la IS kaj pro tio ne laboros la tutan tempon: pro tio estas certaj tempoj dum kiuj la oficejo estas malfermita, ankaŭ la helpantoj por novuloj havas specialajn tempojn dum kiuj vi povas iri al ili, kaj estas certe tre bona ideo uzi tiun oferton ĉar vi povas eble ekkoni aliajn partoprenantojn kiuj estas en la sama situacio kiel vi. La tempojn vi povas ekscii en informiloj en la IS-ejo.
Se vi povas trovi neniun organizanton, ne timu demandi **aliajn partoprenantojn**! Pripensu ke ĉiu alia IS-partoprenanto jam estis en via situacio kaj do ĉiu certe volonte pluhelpos vin.

Fine ni deziras al vi agrablan kaj interesan IS-n!